## 1.

Nigr' vespera,
Neĝa blank',
Vent' kolera
Ĉiun homon faligas al flank'.
Vent' kolera
Blovas tra la tuta tero.

Tordas la vetero
Neĝon de rand',
Glacietas sub pland',
Glite, rule...
Ĉiu paŝant'
Faletas — ho mizerulo!

Sur domoj imprese
Etendiĝas tra strat'
Sur ŝnurego plakat':
„Tutan potencon al Konstituanta Kongreso"!

Maljunulino plore sin ŝovas,
Neniel kompreni povas,
Por kio tia ŝtofpec'
Pendas sen ia bezon'?

Ja al kiom da nudaj knaboj laŭ dec'
Oni kudrus po kalson'...

Kaj kokine la maljunulino
Apenaŭ sin en neĝo transigas.
— Ho, Kompatema Dipatrino!
— Ho, bolŝevikoj*) nin pereigas!

Vento-skurĝo
En frosto vipas sen halt'!
Kaj sur stratkruciĝo burĝo
Forkaŝis nazon en palt'.

Kaj jen kiu estas? — Longhara
Kaj parolanta malklare:
— Perfiduloj!
— Pereis Rusio!
Certe verkisto ia —
Babilulo...

Kaj jen ĉe flanko voja —
Larĝabaska rob',—
Kial nun malĝoja,
Kamarado pop'**)?

---

*) rusaj social-demokratoj-maksimalistoj, poste komunistoj.

**) rusa pastro.

Ja vi iam gravis
En alia rol'
Kaj sur ventro havis
Krucon por popol'?

Jen en pelto sinjorino
Alian ekvidis:
— Jam ni ploris, ploris sen fino...
Subite ekglitis
Kaj — ŝmac! — sur la neĝon eksidis...

He, hé vi!
Helpu ŝin levi!

Kolere mordas
La venta blovado,
La baskojn tordas,
Paŝantojn tiras,
Ĉifas, taŭzas kaj ŝiras
La grandan plakaton:
„Tutan potencon al Konstituanta Kongres
Kaj vortojn rediras:

... Ni ankaŭ havis kunvenon ...
... Apud tiu ĉi magazeno ...
... Diskuti finis —
Kaj difinis:

Por foj' — dek rublojn, por nokto —
dudekkv
Kaj malpli postulu neniu knabi
... Prenu min ...

Malfrua vespero.

La strato fariĝas surdema.
Unu vagulo
Iras kun tremo,
Kaj vento koleras...

Malfeliĉulo!
Aliru —
Por kisi kaj dormi...

Kia celo?
Panon por mi!
Preteriru!

Nigra, nigra ĉielo.

Kolero, malgaja kolero
En brusto ardas...
Nigra kolero, sankta kolero...

Kamarado, rigardu
Severe!

## 2.

La neĝo flugas, la vento spiras,
Kaj dekdu viroj silente iras.

Rimenoj nigraj de la pafiloj...
Ĉirkaŭe — briloj, briloj, briloj...

Cigaredaĉ' en buŝ' heroa,
Sur dorso decus as' karoa*)!

Libero, libero —
Sen kruc' — ha, ha!
Tra—ta—ta!

Malvarme, kamaradoj, malvarme!

— Kaj Joĉjo ja kun Kanjo restas...
— En ŝia ŝtrump' kerenkoj**) estas!

— Sed Joĉjo mem nun estas riĉa...
— Soldato estas li feliĉa!

---

*) signo alkudrata sur dorson de krimuloj.

**) mono je 20 kaj 40 rubloj, emisiita de la R[...] Provizora Registaro dum la revolucio 1917 kaj nom[...] tiel de la popolo moke al la ĉefministro A. F. Keren[...]

— Nu, Joĉjo, burĝo, hundinido!
Nur provu ŝi, kun li perfidu!

Libero, libero —
Sen kruc' — ha, ha!
Kun Joĉjo Kanjo flirtas ja —
Per kio, kio flirtas ja?
Tra—ta—ta!

Ĉirkaŭe — briloj, briloj, briloj...
Sur ŝultr' — rimenoj de l'pafiloj...

Ni tenu paŝon revolucian!
Atendu malamikon nian!

Pafilon ekprenu, amiko, vi tuj!
Ekpafu ni kuglon al Sankta Rusuj' —

Al tirana,
Al kabana,
Dikpostaĵa!

Sen kruc' — ha, ha!

B652
13922

## 3.

Kiel iris niaj knaboj
Servi en gvardio ruĝa —
Servi en gvardio ruĝa —
Bravan kapon mortrifuĝi!

He, vi, malfeliĉo,
Dolĉa vivo nia!
Ĉifonita palto,
Pafilet' aŭstria!

Blovu ni al burĝoj moke
Mondan brulon ĉiuloke,
Mondan brulon en la kor' —
Benu Dio nin Sinjor'!

Гос. Центр. Библиотека
Иностранной
Литературы

## 4.

Krias tra la neĝo voĉo,
Flugas jen kun Kanjo Joĉjo —
Kaj elektra lanterneto
Sur kaleŝtimono...
He, ha, falu vi!

En paltaĉo li soldata,
Kun mieno stulta, sata,
Tordas li lipharojn nigrajn
Kaj retiras,
Ŝercojn diras...

Kiajn Joĉjo havas fortojn!
Kiajn Joĉjo diras vortojn!
Stultulinon Kanjon premas
Kaj intrigas ŝin...

Kapon turnis ŝi en tento,
Kiel perloj brilas dentoj...
Ha, vi, Kanjo, mia Kanjo,
Dikvizaĝa vi!..

## 5.

De trancîl' cikatron, Kanjo,
Tute freŝan havas vi.
Kaj sub mamo via,Kanjo,
Restas la gratita stri'!

He, he, dancu! Havas
Vi piedojn, kiuj ravas!

Frivolece vi paradis
En tolaĵo kun ruband',
Triviale malĉastadis
Inter oficira band'!

He, he, vi malĉastu!
Premas al la brust' balasto!

Ĉu do, Kanjo, ne meditis
Vi pri tiu oficir'? —
Li trancîlon ne evitis...
Ĉu por vi ĝi estas mir'?

He, he, ne forgesu!
Kun vi dormi do permesu!

En dandad' vi vin ne ĝenis,
Jen gamaŝoj, ĉokolad',
Kun la junkroj vi promenis —
Nun eĉ iras kun soldat'?

He, he, pekon faru!
La anim' pli estos klara!

6.

Kuregas la kaleŝ' denove,
Veturigisto krias bove...

Halt, halt! Andreĉjo, vojon baru!
De poste, Peĉjo, vi ekstaru!

Tra-tararah-tah-tah-tah-tah-tah!
La neĝ' tordiĝis sur la strato!..

Veturigisto... Joĉjo ankaŭ...
Ankoraŭ pafu tiun flankon!..

Tra-tararah! Do bone sciu:
Knabinon fremdan ne enviu!..

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Forkuris tamen... ho fripono!
Nu, ni kvitiĝos morgaŭ bone!

Kaj Kanjo kie? — Mort' subita!
La kapo estas trapafita!

Ĉu, Kanjo, ĝojas vi? — Silento...
Do kuŝu, kiel ekskremento!

Ni paŝon tenu revolucian!
Atendu malamikon nian!

## 7.

Kaj denove kun pafiloj
Dekdu viroj kune paŝas.
Nur la pala mortiginto
Jen vizaĝon sian kaŝas.

Ĉiam li plirapidigas
La iradon kun ekscito,
Sur la kolo forte ligas
Sian tukon en hezito...

— Kial vi, amik', silentas
Kaj malgaje tiel iras?
— Kio, Peĉjo, vin turmentas?
Ĉu pri Kanjo vi sopiras?

— Ho, vi, kamaradoj miaj,
La knabinon mi ja amis...
Per la noktoj plej ebriaj
Mian vivon ŝi ornamis...

Pro petolo gajspirita
En okuloj ŝiaj belaj,
Pro makul' de nask' markita
Apud ŝultro blankaŝvela
Pereigis mi malsprita,
Pereigis sen ŝancel'... ha!

— Jen, stultul', ekludis rolon,
Do virin' vin, Peĉjo, tiras?
Ĉu malfacen vian volon
Vi elturni nun deziras?
Tenu super vi kontrolon!
Lasu do, al vi ni diras!

Tempo estas nun alia
Ol ke ni kun vi ĝemadu!
Pli pezega estos nia
Ŝarĝo, kara kamarado!

Kaj hezite kvietigas
Peĉjo la rapidajn paŝojn,
Levi kapon sin instigas,
Ree gaja estas li...

Eh, eh!
Ĝoji ja ne estas pek'!

Baru pordojn vi per trab',
Ĉar hodiaŭ estos rab'!

Malfermu kelojn vi kun knar'
Promenas nun ĉifonular'!

## 8.

Ho vi, malfeliĉo!
Enuo teda,
Morta!

Bone tempon mian
Uzos mi, uzos mi...

Bone la tempion
Kombos mi, kombos mi...

Bone senŝeligos
Semojn mi, semojn mi...

Per tranĉilo grincos
Bone mi, bone mi!..

Flugu for ci, burĝo, kiel pasereto!
Mi trinkos sangeton
Pro amitin' koketa
Kaj nigrobroveta...

Donu, Dio, pacon al animo ŝia...

Enue!

## 9.

a urba bruo jam ne sonas,
Silento super Neva-tur',
Kaj polican' plu ne spionas —
Promenu, knaboj, laŭ plezur'!

Ĉe stratkruciĝo burĝo staras,
Levinte palton ĝis la frunt',
Kaj apud li mizere kaŭras
Preminta voston fava hund'.

La burĝo, kiel hund', malsata
Kaj muta staras sen respond',
Kaj kun vostaĉo subpremata
Post lia dors' malnova mond'.

## 10.

Neĝventego akre blovas,
Ho, blovad', ho, blovad'!
Je kvar paŝoj eĉ ne povas
Vidi ion kamarad'!

Neĝo volvis sin funele
Kaj kolonon levis bele...

— Ho ventego kia, Dio!
— Peĉjo, he, ne fantaziu!
Ĉu vin savis de malbon'
Origita sanktikon'?

Senkonscia vi, rezone
Nur meditu, pensu bone —
Ĉu ne sangaj estas manoj
Viaj pro la am' al Kanjo?

— Vi tenu paŝon revolucian!
Atendu malamikon nian!

Antaŭen, antaŭen persiste,
Popol' laborista!

## 11.

Kaj sen sankta nomo iras ili,
Ĉiuj dekdu — bande,
Akceptante ĉion facile,
Nenion dubante...

Kaj iliaj ŝtalpafiloj
Pafas vasten en silent'...
Al stratetoj plej trankvilaj,
Kie sola blovas vent'...
Kaj en neĝo malfacile
Boto dronas en moment'...

Akrimponas
Ruĝa flag',

Paŝoj sonas
Jen kun krak',

Signon donas
Al arak'...

Kaj la ventego neĝon ŝutas
Dum tempo tuta,
Okulojn pistas...

Antaŭen persiste,
Popol' laborista!

## 12.

Fortapaŝe iras ili...
— Kiu tie do? Elvagu!
Ĝi — la vento maltrankvila
Ludas kun la ruĝa flago...

Jen antaŭe — neĝamaso.
— Kiu en la neĝ' — eliru!..
Nur mizera hund' malgrasa
Sekvas rampe post la viroj...

— Iru for ci, fava hundo,
Tiklos mi per bajoneto!
Mond' malnova, en profundon
Trafaligos mi cin, ĵetos!

... Ĝi rikanas — lup' malsata —
Voston premis — ne postrestas —
Fremda hund' persekutata ....
— He, rekriu, kiu estas?

— Kiu svingas ruĝan flagon?
— Vidu, he, mallumo kia!
— Kies rapideman vagon
Aŭdas jen orelo mia?

Mi cin kaptos tutegale,
Cedu viva ci, pli bone!
Do eliru senbatale,
Aŭ mi pafos senpardone!

Tra-tah-tah! — Kaj sola eĥo
Resonadas en la domoj...
Kaj la sola neĝventego
Ridas, kiel la fantomoj.

Trah-tah-tah!
Trah-tah-tah!

... Tiel iras ili brave —
Poste la malsata hund',
Kaj kun sanga flag' antaŭe,
Tra ventego nevidebla
Kaj per kuglo netrafebla,
Per surventa pas' gracia,
Per ŝutperla mas' glacia,
En blankroza diadem' —
Antaŭ ili — Kristo mem.

Januaro 1918.

Гос. Центр. Библиотека
иностранной
литературы